**NSiR - Nova Sento in Rete**
**N. 1137 (17/2022)**


Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.


Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.


**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm

**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**
Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi, realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli


- Por la Breŝaj busoj Kongreso jam komenciĝis .................................... 2
- Annullo filatelico ........................................................................ 2
- Kongresaj ekskursoj ..................................................................... 2
- UK-kongresnumero unu ................................................................. 4
- AMO 87 – Balta fokuso .................................................................. 4
- Tago de Esperanto, 26a de julio ...................................................... 5
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton ....................................... 6

## POR LA BREŜAJ BUSOJ KONGRESO JAM KOMENCIĜIS!




## ANNULLO FILATELICO

A Brescia, dopo l'interruzione di Assisi dovuta a problemi di tempistica, riprende la tradizione della FEI di proporre l'annullo filatelico.

Sarà disponibile la domenica 21 agosto, in concomitanza dell'inaugurazione, dalle 9.00 alle 15.00 presso l'Auditorio San Barnaba dove avrà luogo l'inaugurazione.
Con l'occasione il gruppo di Brescia ha anche fatto stampare una serie di cartoline per presentare la città con scritte in esperanto.
Ecco un altro motivo per venire a Brescia e partecipare al congresso!

## KONGRESAJ EKSKURSOJ

Karaj gekongresanoj,
post dudeko da tagoj ni fine renkontiĝos en Breŝo kaj vi povos konstati kiom ni laboris por la kongreso kaj kiom la urbo entuziasme kunlaboras kun ni.

Hodiaŭ mi parolos al vi pri la ekskursoj. Bedaŭrinde pluraj el vi ankoraŭ ne decidis kiujn partopreni kaj tio metas nin en enbarasa situacio laŭ organiza vidpunkto.
Ĉi sube mi listigas la proponitajn celojn kaj atentigas vin ke por ilin realigi ni devas havi minimume 20 ekskursantojn.
Do helpu nin proponi al vi ĝuindan semajnon, legu atente la ekskursojn, decidu kaj TUJ informu nin.
Por kelkaj cellokoj necesas sufiĉe fruan antaŭmendon de la enirbiletoj kaj pro tio ni bezonas scii la nombron de la interesitoj.
Dankon pro via komprenemo, jen la ekskursoj:

**21/8 dimanĉe**: 15.00 - 18.00 vizito de Breŝo : unua esplorado de la urbo, laŭ historia itinero, tiel ke vi poste povos decidi ĉu iu aparta loko meritas vian pluan esploron.
**22/8 lunde** 9.00 – 18.00 vizito al Vittoriale kaj al Sirmione: Vittoriale estas la fantasta vilao kiun poeto Gabriele D'Annunzio konstruigis por tie retiriĝi dum la lastaj vivojaroj, tie oni vizitos la domon "Prioria" kaj la ĝardenojn kiuj alrigardas la lagon de Garda kaj en kiuj troviĝas gravaj artverkoj. Poste ni haltos survoje por tagmanĝo kaj fine ni atingos Sirmione, perlo de la lago de Garda, kie ni vizitos la malnovan urbocentron kaj la mondfamajn Grotojn de Catullo.
**22/8 lunde**: 15.00 – 18.00 vizito al Montisola, ĉe lago de Iseo. Ripoziga ekskurso parte per ŝipeto parte piede tra la vojetoj de la ĉefurbeto de la insulo.
**23/8 marde**: 9.00 – 18.00 Milano: tri estos la ĉefaj vidindaĵoj: la kastelo de familio Sforza, kie inter la pluraj artverkoj troviĝas la Pietato Rondanini de Mikelanĝelo; post tagmanĝo en tipa restoracio ĉe la famaj milanaj navigkanaloj, ni havos la eblecon admiri la freskon de Leonardo da Vinci "Il Cenacolo" en la preĝejo Sankta Maria de la Gracoj, por poste atingi la koron de la urbo kaj viziti ĝian katedralon konatan kiel "Duomo".
**23/8 marde**: 15.00 – 18.00 Kastelo de Padernello: Padernello estas eta vilaĝo kun malpli ol cento da enloĝantoj, miniatura vilaĝo, kaj ĝin vizitante oni plonĝas en la etoson de la malnovaj tempoj. La kastelo estis konstruita en la dekkvara jarcento, kaj de tiam kompreneble finkonstruita kaj nun grava kultura centro de la regiono.
**24/8 merkrede**: 9.00- 18.00 Bergamo: la lokaj esperantistoj pretigis por la kongresanoj intensan kaj interesan viziton de la alta Bergamo, nome de la historia urbocentro, kiun oni atingos per ŝnurfervojo, por poste promeni tra la malnovaj stratetoj, kie troviĝas interesaj palacoj kaj preĝejoj, la antikvaj bastionoj kaj turoj kiuj karakterizas la urbon.
**24/8 merkrede** 9.00 – 18.00 : Valo Kamonjka kaj lago de Iseo: la valo famas pro la rokaj gravuraĵoj kiuj admirindas en pluraj vilaĝoj. Ni vizitos Cento-n kaj per agrabla promeno tra la montaro admiros la juvelojn kiujn niaj praavoj postlasis al ni. Post la tagmanĝo ni atingos lagon de Iseo por malstreĉiga posttagmezo ĉe la lagobordo.
**25/8 ĵaŭde** 9.00 – 18.00 Verona: Kvankam la urbo ne estas parto de regiono Lombardia, tamen ni ne povas preterlasi tiun juvelon. Per buso ni unue havos panoraman alrigardon de la urbo, vizitos San Zeno, la plej grava preĝejo en la urbo, kaj alproksimiĝos al urbocentro por tagmanĝo kaj vizito de la Areno, de la centra placoj, de la domo de Julieta, kaj de preĝejo sant'Anastasia.

**25/8 ĵaŭde** 15.00 – 18.00 Franciacorta: temas pri regiono apud Breŝo fama pro vinproduktado. Ni do ne povas preterlasi tion kaj ni vizitos vinproduktejon kun gvidata vizito por malkovri la sekreton de la transformiĝo de vinbero al vino, kaj kompreneble kun fina gustumado de tiu tre ŝatata produkto.
**26/8 vendrede** 9.00 – 12.00 Montichiari: la turisma semajno finiĝas en tiu urbeto por viziti la urbocentron, ĝian katedralon, la preĝejon San Pancrazio kaj fine Kastelon Bonoris.

## UK-KONGRESNUMERO UNU

Durante il congresso universale è tradizione che vi sia un'asta benefica (a favore di uno dei progetti UEA). Tra gli oggetti ed altre cose che si offrono all'asta, vi è anche il numero 1 del congresso universale dell'anno prossimo, in questo caso del congresso di Torino.

Spesso concorrono per accaparrarsi il numero 1 esperantisti della nazione ospitante, in questo caso l'Italia.

Considerato che la delegazione italiana a Montreal è molto limitata, se qualche benefattore intende essere il kongresa numero 1 di Torino, mi contatti privatamente entro il 2 agosto e darò i dettagli.

Grazie

Michela

michela.lipari@gmail.com tel. 3483039924

## AMO 87 – BALTA FOKUSO

Okazis unuafoje ĝis nun Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) en Litovio, kaj entute en la baltaj ŝtatoj. Tio dankindas al la realigo de AMO 87 kadre de la 56-a BET en Klaipeda, apudmara havena urbo de Litovio - la tria plej granda urbo de la lando. La temo estis 'Baltio en Eŭropa kunteksto', kiu estis traktita en Mondskala Kunteksto (socia, politika, kultura, lingva ktp.) kaj Movada, kie ni sopiras pli fortan rolon por la baltaj landaj movadoj, precipe en Latvio kaj Estonio. La litova movado relative bone fortas, kun sidejo en Kaunas (en la Zamenhofa strato 5), kun la kapablo tiri pli ol 250 aliĝintojn al BET.

Post la malfermo kaj bonvenigaj vortoj de la patro de AMO, la podio estis transdonita al prof. Duncan Charters, la prezidanto de UEA, por skizi siajn esperojn por pli vigla rolo por la Landaj Asocioj de la balta regiono. Duncan parolis pri la novaj strategioj por UEA en la mandato de la nova estraro. Li emfazis la subtenon de UEA al la AMO-programo, kiu spertos sian centan seminarion frue en 2023. AMO temas ĝuste pri trejnado kaj UEA nepre bezonas pli bone trejnitajn aktivulojn, interalie kun kapablo regi la teknikaĵojn dum

kongresoj. Unu rolo de AMO estas riveli problemojn, ne por deprimiĝi pri ili, sed por elpensi solvojn aŭ mildigon de la problemo.

Duncan emfazis la historian rolon de la balto en la frua historio de la Movado – jam de Zamenhof mem. Fine, li revenis al la strategia plano kaj ĝiaj fokustemoj, kie la grandaj bezonoj estas sproni la rejunigon de la komunumo, precipe tra Eŭropo kaj partoj de Azio.

La partoprenantaro de AMO en ĵaŭdo estis plej optimisme priskribebla kiel 'modesta', kun nur dek partoprenantoj, sed ja elstaraj aktivuloj el Germanio, Usono, Finnlando, Pollando kaj Litovio. Ambaŭ estraranoj de UEA ĉeestantantaj en BET partoprenis, kune kun la prezidanto de la Germana landa asocio de UEA (GEA), kiu rakontis pri la tradicio de dulandaj kongresoj – ekzemple Germanio kun Danlando, Pollando aŭ Francio, kiuj foje altiris la partoprenon ankaŭ de baltianoj.

Venis freŝa informo por pli vasta publiko: post multjara servado, la finno Tuomo ('ne tuŝu teknikaĵojn') Grundstrom forlasis la prezidantecon de EAF por pludoni la stafeton al pli juna persono el Turku. La patro de AMO, estante la respondeculo en UEA pri landa agado, povis konsili kontaktadon inter Finnlando kaj Norvegio, kiu havas relative junan (laŭ Eo-normoj) prezidanton, s-ron Bård Hekland.


Tio levis la konstaton ĉe la supre nomita patro-figuro, ke Finnlando neniam gastigis AMO-seminarion. Nu, iom post la centa.

Venis fine de la seminario en Klaipeda, ke AMO ne rajtas aroge ordoni al la balto kun fari, kion ni absolute akceptas. Sekve ni iomete modifos la enkondukan prezentaĵon por la seminario antaŭ ol alkroĉi ĝin al la nuna komuniko.

En vendredo okazis FLAM-analizo pri la balta movado. Ni pretigos la rezultojn por tio por baldaŭa EKO-komuniko.

## TAGO DE ESPERANTO, 26 JULIO

Ĝuste antaŭ 135 jaroj, pere de tiu ĉi broŝureto komenciĝis nia aventuro!



## EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON

I menu hanno sempre delle storie affascinanti alle spalle. La traduzione inglese riprende, probabilmente, un passaggio attraverso la parola “jerk”, che vuol dire appunto “cretino, maleducato, irragionevole”. Il piatto però è giamaicano, si chiama “jerk chicken”, ed è una ricetta di pollo piccante tagliato in strisce essiccate e fatte marinare in salsa di spezie. Ma anche “jerk” non è neppure lontanamente inglese, se non per la pronuncia, poiché viene da “charqui”, che è il termine quechua per la carne secca o saltata, e strappata, anziché tagliata, per farle assorbire meglio la marinatura.

